

Ĉi tiu elekto-regularo estas farita surbaze de la Statuto kaj Interna Regularo de ILEI, aprobitaj dum la Komitatkunsido en Voss, Norvegio, la 6an de aŭgusto 1991.

La Regularo, priskribanta la elekton de komisionoj, estraranoj kaj komisiitoj estas aprobita en la komitatkunsido en Avalon Konferencejo apud Geelong, Aŭstralio, la 30an de julio 1997.

A. Komisionoj.

1. Elektokomisiono.

- 1.1 La Komitato elektas el inter si tri-kapan elekto-komisionon (EK) surbaze de la proponoj faritaj de la Estraro, la landaj sekcioj kaj la individuaj membroj.
- 1.2 La proponon oni povas fari ankaŭ dum la elekto-kunsido.
- 1.3 Se estas tri kandidatoj, la voĉdonado okazas per levo de la manoj, se estas pli ol tri kandidatoj, la elekto okazas skribe.
- 1.4 La mandato de membro de EK estas trijara.
- 1.5 La mandato finiĝas kiam la komitataneco finiĝas.
- 1.6 Se membro de EK ekŝiĝas dum sia mandato, la Komitato elektas alian membron, kies mandato daŭras la restantan parton de la mandato de la anstataŭigita membro.
- 1.7 Membroj de EK estas reelekteblaj.
- 1.8 Membroj de EK ne rajtas kandidatiĝi por oficoj en la Estraro.
- 1.9 La elekto-komisiono kolektas kaj kompilas proponojn por plenumontoj de estraraj oficoj, por membroj de komisionoj kaj por komisiitoj, faritaj de la Estraro, de la sekcioj kaj de la individuaj membroj.

2. Kontrola Komisiono pri Financoj

- 2.1 La Kontrola Komisiono pri Financoj (KKF) konsistas el du membroj kaj unu vicmembro, almenaŭ unu el inter la komitatanoj. Kandidato devas esti membro de la Ligo minimume du jarojn antaŭ la elektojaro kaj resti membro dum la tuta mandato.
- 2.2 La oficperiodo de komisionano estas dujara. Ekŝiĝintan membron anstataŭas la vicmembro.
- 2.3 Membrojn kaj vicmembron por KKF povas proponi la Estraro, la landaj sekcioj kaj minimume tri individuaj membroj.
- 2.4 Kandidat-komisionano devas posedi minimumajn sciojn pri la financoj.
- 2.5 La voĉdonado okazas per levo de manoj. En la kazo de pli ol tri kandidatoj la voĉdonado okazas skribe.
- 2.6 Elektitaj komisionanoj estas tiuj kiuj ricevis simplan plimulton el la validaj voĉoj.
 - 2.7.1 Dum la oficperiodo demisiintan komisionanon anstataŭas la vicmembro ĝis la fino de la oficperiodo de la ekŝiĝinto.
 - 2.7.2 La Komitato elektas novan vicmembron, kies mandato validas ĝis la fino de la oficperiodo de la antaŭa vicmembro.
- 2.8 Ekŝiĝintaj membroj rajtas rekandidatiĝi.

3. Laborkomisionoj

- 3.1 La Komitato povas starigi laborkomisionojn. Por ĉiu starigota komisiono ĝi fiksas la taskon, la nombron de membroj kaj vicmembroj kaj la oficperiodon.
- 3.2 El la membroj de laborkomisiono minimume unu estas komitatano. La aliaj devas esti membroj de la Ligo minimume du jarojn antaŭ la elektojaro kaj resti membroj dum la tuta mandato.
- 3.3 La voĉdonado okazas per levo de la manoj. En la kazo de pli ol elekteblaj kandidatoj la voĉdonado okazas skribe.
- 3.4 Elektitaj komisionanoj estas tiuj kiuj ricevis plej multajn el la validaj voĉoj.
- 3.5 Komisionano devas esti membro dum la tuta oficperiodo.
- 3.6 Demisiintan komisionanon anstataŭas vicmembro ĝis la fino de la oficperiodo. Se ne estas vicmembro, la Komitato elektas novan membron, kies mandato validas ĝis la fino de la oficperiodo.

3.7 Eksiĝintaj membroj rajtas rekandidatiĝi.

B. Estraro.

- 4.1 La kandidatojn por la Estraro proponas la Estraro, la landaj sekcioj kaj minimume tri individuaj membroj. Eksiĝinta estrarano estas reelektebla.
- 4.1.1 La proponoj devas esti skribe prezentitaj al la elekto-komisiono (EK), prefere antaŭ la komitatkunsido.
- 4.1.2 La proponojn oni povas fari ankaŭ dum la komitatkunsido, kondiĉe ke ili estas subtenataj de minimume kvin komitatanoj.
- 4.1.3 Al propono devas esti aldonita skriba konsento de la kandidato kaj kelklinia biografio.
- 4.2 Kandidato devas esti membro de la Ligo minimume du jarojn antaŭ la elektojaro kaj resti membro dum la tuta mandato.
- 4.3 La mandato de kandidato kiu anstataŭas estraranon eksigintan dumofice daŭras ĝis la fino de tiu de la anstataŭito.
- 4.4 Kandidatoj por anstataŭi eksigintan prezidanton aŭ sekretarion ne aŭtomate prenas ties funkcion.
- 4.5 La EK prezentas la kandidatojn al la Komitato.
- 4.5.1 Post la prezento la EK invitas la komitatanojn pridemandi la kandidatojn.
- 4.5.2 Post la elĉerpo de la diskuto la EK proponas fermi la elektoliston.
- 4.6.1 La elekto de estrarano okazas skribe. En kazo de unu kandidato la prezidanto rajtas proponi voĉdonon per manlevo.
- 4.6.2 La EK disdonas la voĉdonilojn al la komitatanoj.
- 4.6.2 Kandidatoj estas elektitaj ricevinte simplan plimulton el la validaj voĉoj.
- 4.6.3 Se oni ne elektis la necesan nombron de estraranoj pro la fakto ke du aŭ pli da kandidatoj ricevis saman plimulton el la validaj voĉoj, la EK invitas la komitatanojn al dua voĉdono pri tiuj kandidatoj.
- 4.6.4 Se oni ne elektis la necesan nombron de estraranoj pro la fakto, ke kandidato(j) ne ricevis la plimulton el la validaj voĉoj, la EK invitas la komitatanojn al dua voĉdono pri tiu(j) kandidato(j).

C. Estrara komisiito.

- 5.1.1 Se post la divido de la taskoj en la Estraro montriĝas ke pri iu grava agadkampo ne povos okupiĝi iu estrarano, la Estraro povas proponi al la Komitato elekti estraran komisiiton.
- 5.1.2 La tasko de la komisiito ne povas esti financaj aŭ sekretariaj laboroj.
- 5.1.3 La nombro de la elekteblaj komisiitoj ne rajtas superi la duonon de la nombro de estraranoj.
- 5.2.1 Kandidaton por estrara komisiito povas proponi la Estraro, la landaj sekcioj kaj la elekto-komisiono. La propono estas skribe prezentata al la Komitato kun aldono de skriba konsento de la kandidato kaj kelklinia biografio.
- 5.2.2 Kandidato devas esti membro de la Ligo minimume du jarojn antaŭ la elektojaro kaj resti membro dum la tuta mandato.
- 5.2.3 La mandato de estrara komisiito estas trijara.
- 5.2.4 Eksiĝinta komisiito estas reelektebla.
- 5.3.1 Al la komitato la EK prezentas la kandidato(j)n.
- 5.3.2 La EK invitas la komitatanojn pridemandi la kandidato(j)n.
- 5.3.3 Post la elĉerpo de la diskuto, la EK proponas fermi la elektoliston.
- 5.4.1 La elekto de estrara komisiito okazas skribe.
- 5.4.2 Kandidato estas elektita ricevinte la simplan plimulton el la validaj voĉoj.
- 5.4.3 En kazo de unu kandidato la prezidanto rajtas proponi voĉdonadon per manlevo.
- 5.5 La elektita estrara komisiito havas ĉiujn rajtojn en la Estraro krom voĉdonrajton.